



Novjorka Prismo

Numero 121

Februaro 2003

La Esperanto-Societo de Novjorko kore invitas vin al sia februara kunveno . . .

DATO: Vendredon, la 21-an de februaro 2003, 6:30-9:00 ptm

LOKO: United Federation of Teachers
260 Park Avenue South (20th/21st Streets), NYC
2nd floor (check schedule in lobby for room number)

PROGRAMO: 6:30 – Babilado kaj refreŝigaĵoj.
7:00 – George Baker prelegos pri
La nova ponto trans la golfo de Oakland. ★

Protokolo de la kunveno de la 17-a de januaro 2003

Tomaso ECCARDT malfermis la kunvenon je la sepa horo ptm. Ĉeestis 13 personoj. Ĉeestis neniuj gastoj.

La protokolo de la 20-a de decembro estis akceptata. Neniu sugestis iun ajn korektaĵon.

Tomaso anoncis, ke la klaso ĉe K-Mart komenciĝas je la unua horo ptm sabate.

Rochelle F. GROSSMAN ricevis leterojn. Unu estas adresita al nekonata esperantisto. Alia letero venas de patro kaj filo el Francio, kiuj serĉas helpon de loka esperantistaro, kiam ili vizitos Novjorkon venontjare. Ankaŭ, tri japanoj vizitis la oficejon, kaj unu donis al Rochelle japanajn kuketojn. Rochelle montris al ni ĵurnalon, kiu enhavas kvar-paĝan artikolon pri poŝtmarkoj, kiuj temas pri Esperanto.

Sofiya SOSKINA anoncis, ke ŝi ricevis leteron el Varsovio, Pollando, de Lydia TABOR, longtempa membro de nia klubo. Ŝi ankaŭ ricevis leteron de koreo. Sofiya montris al ni numeron de la ĵurnalo *Esperanto* (1/2003), en kiu aperas bildo de la ĉeestantoj de nia kluba pikniko lastan jaron.

Je 7:25 ptm, Alfredo PETROV komencis sian prelegon pri sia laboro kiel geologo. Li serĉas malofte trovatajn ŝtonojn kaj mineralojn, kiuj valoras multoble pli ol oro kaj arĝento, ĉar sciencistoj pretas pagi grandajn sumojn por havi ilin.

Alfredo montris al ni bildojn el la lando Bolivio, kie li trovas la plejparton de siaj ŝtonoj. La bildoj montris montojn, montetojn, areojn de pura salo, kaktojn, kaj strangajn lignajn plantojn. Alfredo parolis pri la minoj, kiuj parolas la keĉuan lingvon, kaj esprimas sian respekton al la dioj de la minoj – statuoj, kiuj ricevas cigaredojn kaj aliajn aferojn kiel donacoj por certigi la sekurecon de la minoj dum ilia serĉado tra la minoj.

Post la prelego, kiu finiĝis ĉe 8:25 ptm, la ĉeestantoj faris demandojn al Alfredo.

Je 8:40 ptm, Tomaso oficiale fermis la kunvenon. Post la kunveno, kelkaj ĉeestantoj iris al la restoracio-manĝaĵvendejo Emma's Dilemma por manĝi kaj trinki. ★

Protokolis: Stuart GREEN

Jon Liechty koncertas

La 31-an de januaro, Tomoko Yamashiro-Petrov kaj mi ĉeestis belegan koncerton ĉe la Turtle Bay Music School. Koncertis Jon Liechty, pianisto; Javier Oviedo, saksofonisto; kaj Stanely Hoffman, violonisto/violisto. La programo ofertis verkojn de komponistoj Paul Creston, Adolf Busch, Georges Enesco kaj Paul Hindemith. Jon Liechty, esperantisto de nia societo, studis muzikon ĉe la Indiana University School of Music en Bloomington, Indiana. Li koncertis en Baku, Azerbajĝano, Bruselo, Londono, kaj en diversaj usonaj urboj. Li pasigis kelkajn jarojn en la Mez-Oriento kaj li estis unu el la fondintoj de la "Saba Ensemble". Gratulon, Jon, pro la bela koncerto. ★

– Rochelle F. GROSSMAN

IBM Plaza

La duan de februaro, pli malpli 10 geesperantistoj renkontiĝis ĉe IBM Plaza por manĝeti kaj paroli. Ni konversaciis pri pluraj aferoj, i.a. la Mez-Oriento kaj la turkaj lingvoj. ★

– Tom ECCARDT

E-Anekdotoj

Ĉiuj subaj eventoj okazis en mia ĉeesto (krom la unua – mi ne estas tiom olda).
Pri Zamenhof.

En 1905 en franca urbo Boulogne-sur-Mer okazis la unua Esperantista Kongreso. Kelkaj urbanoj, precipe knaboj, estis entuziasmegaj kaj lernis la Lingvon Internacian. Matene L.L. Zamenhof iris al la strato por aĉeti lokan gazeton. Li sin turnis al knabo, kiu vendis ĵurnalojn, kaj petis ekzempleron — memkompreneble, franke. Kiel estis li surprizata, kiam la knabo respondis en la lingvo de Zamenhof: "Parolu Esperante, Sinjoro!"

Patro, Pitro, Putro.

Multajn jarojn antaŭe, post konatiĝo kun Esperanto, mi multe vortludis kun nia kara lingvo. Kiu diras, ke Esperanto estas preciza? Tute ne. Kiam oni diras *patro*, nenio estas konata pri la patridoj. Ni ŝanĝu la vorton. Diru *pAtrO*, kiam ulo havas vivantaj infanoj. Kaj se ili mortis? Tiam ni nomu lin *pItro*. Juna edzo, kies edzino estas graveda, estu *pOtro*. Kaj sekse aktivan viron, kiu eĉ ne scias, ĉu de li naskiĝis ajnaj idoj, ni nomu *pUtro*.

Pri H.Tonkin.

Profesoro Tonkin, vizitante Finnlandon, ricevis inviton de leningradanoj. La inviton ne aprobis KGB, sed ni tion ne scias (ĉar ajna turisto en Finnlando rajtis veni al urbo Leningrad, nuna Sankt-Petersburg). Tamen kontaktoj kun eksterlandanoj devis esti aprobitaj de la sekurecinoj. Nia, moskva grupo akompanis la profesoron, dum leningradanoj atendis lin apud la Palaco ĉe Fontanko. Ili ne povis eniri la palacon, ĉar gardistoj ne lasis ilin enen, dirante ke profesoro Tonkin estas ege malsana kaj troviĝas en hospitalo. Kiam nia grupo venis al la pordoj de la Palaco, ili ripetis la mensogon. La profesoro respondis: "Iam Mark Twain en simila okazo diris: 'Onidiroj pri mia morto estas troigitaj'". Kaj H.Tonkin prezentis sian Usonan pasporton. Lia renkontiĝo kun ruslandaj e-istoj tamen okazis. ★

— Alex KARKOVSKY

Esperantaj adverboj

Ĉu vi kredas, ke la vort-ordo de Esperanto estas tre fleksebla? Tion oni instruas al ni. Sed ekzistas almenaŭ unu gramatika areo kie vort-ordo ne estas tiom fleksebla: adverboj. Ekzemple, oni devas ne ignori la ordon de la adverbo *ne*. Sed la ordon de rekta objekto oni ne devas multe atenti. En la lasta frazo, *oni devas ne ignori* signifas, ke oni ja devas atenti. Male, *ne devas* signifas neniun devon. La regulo estas, ke la adverbo modifas nur la vorton, kiu tuj sekvas ĝin.

Aliflanke, manko de fleksebleco en vort-ordo ofertas pli da esprima precizeco. Kiel dirite supre, *ne devas* havas malsaman signifon ol *devas ne*. Tiel Esperanto povas esprimi du malsamajn signifojn pere de nur du vortoj. Sed kiuj adverboj obeas striktan vort-ordajn regulojn? Ĉu la reguloj estas tut-inkluzivaj?

Ne tute. Plejparte, la adverboj, kiuj deriviĝas de adjektivoj ne postulas striktan vort-ordon: *rapide li iris, li rapide iris, li iris rapide*. Escepto estas la vorto *tute*. Derivata de la adjektivo *tuta*, ĝi tamen modifas la vorton, kiu tuj sekvas ĝin: *tute ne* ne egalas *ne tute*. *Tute ne* signifas tutan neadon. *Ne tute* indikas partan neadon.

La adverboj *ne*, *ankaŭ*, kaj *nur* estas aparte postulemaj pri vort-ordo. *Ne mi havas hamstron, mi ne havas hamstron*, kaj *mi havas ne hamstron* estas tri eblaj frazoj kun tri malsamaj signifoj. *Mi havas hamstron ne* estas iom duba, ĉar nenio sekvas la vorton *ne*. En tiaj frazoj *ne* mi sugestas, ke eble alia homo havas hamstron, sed ne mi. *Ne hamstron* sugestas, ke verŝajne mi ja havas alian beston.

Foje, anglalingvanoj emas misuzi *ankaŭ* kaj *nur*. Oni emas diri *mi ankaŭ havas hamstron* anstataŭ *ankaŭ mi havas hamstron*. *Ankaŭ havas* sugestus, ekzemple, ke krom koni hamstron, mi ankaŭ havas unu. Oni aŭdas ankaŭ *mi nur havas hamstron*, anstataŭ *mi havas nur hamstron*. La unua sugestas, ekzemple, ke kvankam mi havas hamstron, mi eble ne manĝigas ĝin, mi nur posedas ĝin. Ĉar tiuj du adverboj modifas la vorton, kiu sekvas, *ankaŭ havas*

Societa Kalendaro

Venu al niaj venontaj renkontiĝoj!
Metu tiujn datojn en vian kalendaron.

Februaro 2003 **21**

ESNY KUNVENO
La Nova Ponto Trans La Golfo de Oakland – prelego de George Baker
Vendredon, 6:30 p.m. ĉe UFT

Marto **2**
Tagmanĝo
Dimanĉon, 1:00 p.m. ĉe IBM
(Limdato por kontribuoj por *Prismo* 122)

ESNY KUNVENO **21**
Vendredon, 6:30 p.m. ĉe UFT

United Federation of Teachers (UFT)
260 Park Avenue South, NYC
(20th/21st Streets), second floor
(check schedule in lobby for room number)
"IBM" Building Atrium (antaŭa nomo)
590 Madison Avenue (56th Street) NYC
Street level, in the Atrium

kaj *nur* *havas* kontrastas nur la verbon *havas*, sed nek mi nek *hamstron*.

Krom *devi*, aliaj helpoverboj funkcias simile kun la adverbo *ne*. *Mi ne rajtas iri* ne egalas *mi rajtas ne iri*. La unua signifas, ke mi ne havas permeson iri, la dua, ke mi ja havas permeson resti. Aliaj tiaj helpoverboj estas *povi* kaj *voli*. Kvankam *mi ne volas iri* kaj *mi volas ne iri* ambaŭ implicas, ke finfine mi ne iros, iliaj signifoj ne estas tute egalaj.

Ne kombiniĝas ankaŭ kun aliaj adverboj, ekzemple, *ne nur* ne egalas *nur ne*. Do, *ni manĝis, ni ne nur parolis* ne egalas *ni manĝis, ni nur ne parolis*. La unua signifas, ke krom paroli, ni manĝis. La dua signifas ankaŭ, ke ni manĝis, sed la sola afero kiun ni ne faris estis paroli.

Nu, mi devas fini la artikolon, kvankam mi ne nepre menciis ĉiujn eblecojn. Se vi ne tute komprenis, vi devus relegi kaj repensi. Aŭ konsulti sekciojn #90, #91 kaj #273 de Plena Analiza Gramatiko. Sed nepre ne ignoru la vort-ordon de adverboj, mi petas! ★

— Tom ECCARDT

ESPERANTO-SOCIETO DE NOVJORKO

c/o UEA, 777 UN Plaza, NY, NY 10017 (212) 687-7041
http://www.geocities.com/esperanto_nyc

Prezidanto
Thomas Eccardt
(212) 477-6516

Korespondanta Sekretariino
Rochelle F. Grossman
(718) 457-1490

Protokolisto
Stuart Green
(631) 751-5683

Vicprezidanto
Thomas Leong
(718) 981-4252

Kasistino
Sofiya Soskina
(914) 738-6084

Program-Direktoro
Neil Blumstein
(212) 663-2020

Novjorka Prismo

Numero 121 – Februaro 2003
ISSN: 1059-5627

<http://members.aol.com/novjorka/prismo>

Redaktoro
Jim Medrano
(212) 982-5029

Subredaktoroj
Thomas Eccardt
Nancee Medrano

Desegnistino
Mary Pulley

Sendu kontribuojn al:
Jim Medrano, 400 East 20th Street #1B, New York, NY 10009-8103
e-poŝto: jimmedrano@mac.com
© 2003 Esperanto Society of New York